

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1995 — 1


(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... K. Kalocsay, la gramatikisto...



... Kaj la akvotemo en la Nobla Korano.

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17,rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
La Parizaj Stratoj (S. Boniol)	3-4
Karikaturoj: la organizanto (Baghy)	5
Kalocsay: la gramatikisto (F. Boyet)	6-8
La akvo-temo en la Nobla Korano	9-10
La Ermito (G. de Maupassant)	11-13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

EL GRESILLON

Pro la diversdateco de la Printempaj Lernejaj Ferioj, estis malfacile, dum la antaùaj jaroj, organizi la Internacian Infan-renkonton dum libertempa periodo komuna je la pli multo el la regionoj. Tiu fakto mal-kontentigis kelkajn instruistojn, kiuj ne povis partopreni kun siaj lernantoj. Pro tio, estis decidite, dum la oktobra organiza kunveno, ke provo de dua Infan -renkonto estos farita. Ŝajnas, ke tiu dua semajno estas sukcesa. Alvenis jam nun (komence de marto) aliĝoj por 50 infanoj. Sed, same kiel por la tradicia Internacia Printempa Infan-renkonto, la problemo por la instru-istoj loĝantaj en malproksimaj landoj, ĉefe en Orienta Eùropo, estas la kosto de la vojaĝo. Por finance helpi ilin estis starigita, antaù pluraj jaroj, speciala "Fonduso por la Infanrenkonto". Dank'al la donacoj, etaj aù egaj, la organizantoj povis, ĝis nun, repagi parton de la vojaĝ-elspezoj por venigi geknabojn el Ĉeĥio, Rusio, Hungario... Kun la organizado de la dua semajno duobliĝis la bezonoj. La monhelpoj alvenas regule. Sed estas necese atendi la donacojn antaù ol certigi helpon al la aliĝantoj. Kaso iom pli plena ebligus pli "flekseblan" uzadon de la donacoj. Do, geamikoj, dank'al via malavar-eco la rondo de la infanoj ampleksiĝos kaj la Internacia Printempa Infan-renkonto ankoraù pli internaciiĝos. Tiu jam nun tradicia okazaĵo, grava kvankam ne sufiĉe famigita, alportas, se ne al Gresillon, kies profito estas mini-muma, almenaù al la Esperanto-movado, junan sangon.

NIAJ PERDOJ

Denove la rondo de la "amikoj de la unuaj jaroj" malpliiĝas. Antaù ne longe malaperis Rose Benaïm kaj Marcel Ligot.

Rose Benaïm kaj ŝia edzo Henri estis fidelaj vizitantoj de Gresillon Neniu forgesis ilian afablecon. Al ŝia familio ni prezentas niajn amikoajn kondolencojn.

Marcel Ligot, kiun malsano tenis for de la poresperanta agado dum jaroj, estis amiko de Gresillon, kie li gvidis kursojn. Al Lea, lia edzino, ni sendas niajn amikajn sentojn.

ESPERANTO TRA LA MONDO

PRI KONGRESOJ -Lige al la 50-a jubileo de UN, la elektita temo de la 80-a Univertsala Kongreso, en Tempere (Finnlando), de la 22-a ĝis la 29-a de julio, estos: "Ni, la popoloj, unu mondo aù disaj eroj".

Estas antaùvidite dum la kongreso, okazigi modelan UN-asembleon, kun la temo: "La pozicio de la minoritatoj ene de nacioj", por montri, kio povus reale okazi en kunveno de UN... se oni uzus nur internacian lingvon. Por realigi la projekton estus necese disponi pri skipoj de 2 aù 4 reprezentantoj el kvindeko da landoj, prefere 16-26-jaraj, kiuj kondutus, kiel veraj delegitoj ĉe UN. Kontakti Geoffrey Greatrex, 39 William Street, Oxford, OX1 3DP, Britio.

En la programo de la Eùropa Kongreso, Parizo de la 2-a ĝis la 6-a de junio, okazos kunvenoj pri la temo: "Nia Eùropo, ĉu landaj asocioj havu komunan pripolitikan agadon?", prelegoj de Claude Piron kaj Gian Carlo Fighiera, teatra vespero kaj interesaj ekskursoj. Informiĝu en UFE, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

La 50-a Kongreso de SAT-Amikaro okazos en Mittelwihr, Alzaco, proksime al la urbo Colmar, de la 15-a ĝis la 18-a de aprilo. Krom la kutimaj kulturaj kaj artaj aranĝoj okazos ekzamen-sesio, kaj dimanĉe, la jarkunveno de Germana Libera Esperanto-Aocio. Informoj: SAT-Amikaro, 67 Avenue Gambetta, 75020 Paris.

PRI LA"MAZI"-PROJEKTO- La projekto pri profes-nivela video-kurso de Esperanto, laù adapto de la internacia serio " Mazi ", povos realiĝi en 1995. Efektive, alvenis antaù la fino de 1994 proksimume 1 1OO antaùmendoj (oni postulis 8OO) je la favora antaùpago de 98 gld. Nun la prezo estos 198 gld.

NOVAJ TERMINAROJ- Aperis en Rusio Esperanta-rusa-ukraina-angla vortaro pri juro. Ĝi entenas 2 587 terminoj, en 402 paĝoj. Mendebla ĉe UEA.

Internacia vortaro de mikroba genetiko verkita de Ralph A. Lewin. 117 paĝoj.

Ni memorigas la aperon de la tria eldono, fare de SAT-Amikaro, de "Grand Dictionnaire Espéranto-Français", riĉigita de 1 6OO novaj radikoj.

KIE NI RENKONTIĜOS TIUN JARON- La tradiciaj somerkursoj en la universitato de San Francisco okazos de la 26-a de junio ĝis la 14-a de julio. La profesoroj estos: Duncan Charters, de la universitato de Indiana, Spomenka Ŝtimec, la konata esperantista verkistino de Zagreb, Atilio Orellana Rojas, poliglota profesoro de esperanto, el Argentino, kaj Setsuko Umeda, direktorino de Internacia Kultura Laborejo en Japanio. Petu informojn: Caty Schulze, 410, Darrell Road, Hillsborough, CA 94010, Usono.

Konferenco "Turismo kaj medioprotektado" 1-7a de julio, en Budapeŝto; prelegoj, ekskursoj, kultura programo, vizitoj. Informas: Hungara esperanto-Asocio, H-1368 Budapeŝto, Pf. 193, Andrassy ul. 27.

Internacia Medicina Konferenco, 12-a - 15-a de julio, en Ternopil (Ukrainio). Aliĝo: LOK de la 1O-a IMEK (Esperanto-Medicino-Scienco-Kunlaboro), Pf. 83, UA- 282001 Ternopil, Ukrainio.

NIAJ BIBLIOTEKOJ- En Hungario, S-ro Arpad Göncz, prezidento de la Respubliko, persone enmanigis disting-medalon de "Malgranda kruco de Ordeno de la Hungara Respubliko" al "esperantisto Karoly Fajszi", kiu establis faman librokolekton de 20 000 esperantaj libroj, kio estas certe unu el la plej grandaj privataj bibliotekoj en Eùropo. La zorgadon de tiu biblioteko transprenis la landa fremdlingva Biblioteko de Hungara Kultura Ministerio.

En ĉeesto de prof. John Wells, prezidanto de UEA, estis oficiale inaùgurita en Massa (Italio), la Nacia Biblioteko kaj Arkivo de Esperanto. Al tiu biblioteko, frukto de longa laboro de la gefratoj Dazzini, Itala Esperanto-Federacio donacis sian valoran kolekton.

LA PARIZAJ STRATOJ

DUM LA XIII-a JARCENTO

Ĉu vere taùgas la termino "strato" por signi tiujn koto- kaj fekoplenajn pasejojn tiel mallarĝajn, ke la ambaùflankaj loĝantoj apogitaj al fenestrorandoj povis facile interbabili? Komence de la jarcento oni kalkulis proksimume 180 stratojn en la tuta urbo. Sed neniu defluilo; ĉie senpavima malglata grundo, sur kiu plaùdadis anseroj, kunikloj, anasoj kaj porkoj. (Iom antaùe, en 1131, la kronprinco estis renversita de unu el la tieaj vagantaj porkoj, kaj sekve li forpasis.

En 1191 la reĝo Filipo-Aùgusto estis tiel naùzita kaj kvazaù sufokita de la haladzo ĝis lia nazo alsupranta, ke li ordonis, ke per kvadrataj pavimoj oni ekipu ĉiujn urbajn stratojn. Tamen en la komenco, nur la du iom pli larĝaj vojoj, kerne de la urbo interkruciĝantaj estis plibonigitaj laù la reĝa ordono, sed duono de la urbo ankoraù ne estis pavimita sub... Ludoviko la XIII-a.

Filipo-Aùgusto multe zorgis pri la bazaroj, precipe pri la centra halo, kie ĉiu komercofako havis sian sekcion. Multenombraj aĉetantoj tie svarmis ĉiun sabaton. Ludoviko la IX-a plilarĝigis la lokon kaj aldonis du pavilonojn por la draponegoco; tial la jenaj tipaj stratonomoj: de la Ŝufarado, de la Tukfarado, de la Granda (de la Malgranda) Ĉifonaro.

Krome oni kalkulis tri foirojn. La plej vizitata okazadis inter la II-a ĝis la 24-a de junio kaj nomiĝis " landit ". Ĝi situis sur Sankta-Deniza ebenaĵo. Tie rendevuis la tuta negocistaro kaj tiama industrio; eĉ venis varoj el Flandrujo. Ĉiuj korporacioj tien procesie iradis post la katedrala klerikaro, kiu solene benis la malfermon de la foiro. Subsone de fifroj kaj trumpetoj jen venis la studentoj, duope, el sia "transponteta kvartalo", por aĉeti la necesan jarprovizon de pergamenaj rulaĵoj, sed ili rajtis aĉeti nur, kiam la rektoro estis por si mem elektinta. Burleskuloj, histrionoj, muzikistoj brue amuzis gajoplenan popolon.

Aparte menciindas la multnombra potenca korporacio de la viandistoj, kiu formis apartan komunumon sine de la burĝaro. Viandistan tablon oni heredis de viro al viro sur loko signita de la preposto: viandistejoj de la Templo, kvartalo Sankta Jakobo de la viandistejo, strato Sankta Petro de la Bovoj. Poste estis permesite al viandistoj vendi ankaù fiŝaĵon: stratetoj de la Buĉado, de la Tripvendejo, de la Bovpiedo, de la Malnova Haringvendejo.

Fine de la jarcento la enloĝantoj kalkuliĝis je 215 mil kaj disponis je proksimume 350 stratoj, 10 placoj kaj 11 interkruciĝoj.; sed estas malfacile ekzakte kalkuli, ĉar kelkaj rektaj stratoj alprenis tri aù kvar malsamajn nomojn kaj nenio precize signis la lokon, kie okazas la nomŝanĝiĝo.

Iu funkciulo, la vojoficisto, estis komisiita ĉion organizi tra la urbo. Neniun ŝanĝon, eĉ duarangan, la loĝantaro rajtis sen lia permeso. Tamen plena obeo venis nur post unu jarcento.

Post la vesper-anĝelusa sonorado ĉiuj butikoj estis fermitaj. Regis plenaj silento kaj mallumo post la bruo- kaj trafiko-plena labortago.

Dimanĉon kaj dum la festotagoj la tuta popolo kuniĝis en la sennombraj preĝejoj, kies gotikstilo tiam apogeis. Post la Di-servoj, kelkaj vizitis tavernistojn, dum la burĝoj promenis kun la familio sur la ĝardenoj kaj vinberejoj, kiuj ĉirkaùis la urbon.

Ĉiurimede la komercistoj provis tiri la atenton de la aĉetontoj. Tial estis malpermesite laùtvoki aĉetonton antaù ol li estis elirinta el la najbara butiko aù budo. Ĉar centralizitaj estis la metioj: sur la sama strato najbaris la samaj metiistoj, membroj de la sama metifrataro. Jen kelkaj signifoportaj stratonomoj: de la Salvendejo (fiŝvendistinoj, salfaristoj), de la Ĉarfarado, de la Ĵonglistoj, de la Jungilejo, de la Peltfarado, de la Gipsistoj, de la Skribistoj, de la Pergamenvendistoj...

Ankaù svarmis amaso da lokŝanĝaj vendistoj, kiuj trakuradis la urbon ĉiudirekten kaj laùtvokis:: "Fiŝaĵon", "freŝan kaj salitan viandon", "flugilaĵon", "ajlon", "cerefolion", "mielon", fromaĝon", "lakton", "fruktojn", "sapon", "ŝtipojn", "brulkarbon", "meĉojn brilajn kiel steloj"...Ĉiufoje, kiam vinvendisto estis spilonta barelon, la novaĵo kaj vinprezo

estis laûte anoncataj. Kelkaj flikis la kuirilaron kaj vestaĵojn antaù la dompordoj.

Ekde la tagiĝo servistoj anonçis la malfermon de la vaporbanejoj. Vespere la vaflofritistoj iradis surstrate kun korboj plenaj je vafloj, risoloj kaj oblatoj, de blanka tuko ŝirmataj. Kaj profesiaj anoncistoj (ses mastroj kaj ties subuloj) anstataùis niajn gazetojn, diskonigis la polic- kaj reĝ-ordonojn, foriĝintajn infanojn, baptofestojn, geedziĝojn, enterigojn, ktp. Koncerne la enterigojn ili trakuris la stratojn kun sonorileto enmane kaj kutimis gurde diri:" Vekiĝu jam, endormiĝintoj, Di-preĝu por la forpasintoj!". Oni ne forgesu la fratulojn, kiuj almozpetadis por sia ordeno. Dume, sur placoj kaj pontoj, tamtamadis ĉarlatanoj kaj ĵonglistoj.

Sur la dekstra bordo de Sejno pompis la kvartalo la plej loĝata kaj riĉa: oraĵistoj, armilistoj, drap- kaj meblo-faristoj. El la 15 200 impostpagantoj dum la jaro 1292, 11 469 loĝis en tiu kvartalo, kie konstruiĝis la unua publika fontano.

Tute malsamaspekta, la studenta kvartalo, ĉirkaù la monto Sankta Ĝenoveva! Tipa montriĝis tiu strato "du Fouar", malluma kaj malseka, elvokita de Danto, kie, 3 jarcentojn poste, Rabelais enscenigos sian Pantagruelon. La nomo devenis de antikva vorto signanta la pajlon, sur kiu sidadis la studentaro dum la kursoj. (La supre-menciita strato situis apud strato Maubert, laùvorte: "Majstro Alberto", laù la nomo de fama dominikano, kiu tie instruis.) En malhavo de horloĝoj tiu bruema junularo reguligis sian labor- kaj amuz-vivon laù la sonorado de la ĉieaj preĝejoj.

Sed ankaù dibocejoj multnombris kaj tiel altaj estis la luprezoj poŝtulataj de la ludonantoj, ke necesis papa buleo, por ke la afero finsolviĝu. Pro tio fondiĝis laùvicaj kolegioj, el kiuj la plej fama, la "Sorbono", akceptis la teologian fakultaton.

La pontoj, kiuj interkomunikigis ambaù riverbordojn kaj la civit-insulon, foje el ŝtono, foje el ligno, regule disfalis kaj estis rekonstruitaj... kun domoj kaj butikoj por ilin plifirmigi.

Tre gravis la rivero Sejno, pere de kiu eksterurba negoco estis praktikata; grava do, eĉ je politika vidpunkto, la korporacio de la ŝipistoj, kiu alprenis la nomon "pariza hanso". Ĝia ovala sigelo prezentis boaton kun masto ambaùflanke subtenata de ŝnuregoj (el ĝi originas la pariza blazono.).

Kvar havenojn la Hanso starigis. Kaj la negoca ekspansio favoris la urbon per riĉa kaj inteligenta burĝaro. Koncentrita estis la povo en la manoj de la preposto de Parizo, super kiu regis nur la reĝo. Poste liajn funkciojn prenis sur sin la Hanso-ĉefo, kiun, ĉirkaù 1228, oni titolis "preposto de la negocistoj". Kelkajn jarojn poste, 4 skabenoj kaj 24 konsilantoj, inter la burĝoj elektitaj estis komisiitaj por lin helpi. Jen la antaùuloj de niaj urbestro, vicurbestro kaj urba konsilantaro.

Ĝis la reĝado de Ludoviko la IX-a, la reĝoj pagis dumnoktan gvatistaron konsistantan el 20 rajdantoj kaj 40 piedirantoj, sub aùtoritato de la Kavaliro de la Gvatistaro. Tamen foje, anstataù la popolon protekti, la gvatistoj tute inverse agadis. Joinville raportas, ke iun belan nokton, ili impetis triope al juna kleriko, kiu sukcesis mortigi ĉiujn tri. Poste la burĝoj petis permeson prizorgi mem sian sekurecon (1254).

Ĉu ne ŝajnas al ni, ke ni aùdas la noktan gurditaĵon horon post horo? Kaj baldaù sonos la vokoj de la tagaj aktoroj. Tiel nokte kaj tage eĥis Parizo en tiu epoko; ĝi eĥasd plu en la koroj de la Pariz-amantoj.

S. BONIOL

PLANTOJ JA HAVAS SENTOJN!

La plantoj povas aùdi, gustumi, paroli, mezuri la tempon, reagi al gravito, kaj ili posedas nervosistemojn. Kelkaj povas eĉ kalkuli aù prognozi! La delegitoj ĉe konferenco de la British Association (Brita Asocio de la Sciencoj aùskultis kun intereso kaj plezuro tiun lastatempan konfirmon fare de botanikisto Pro Malcom Wilkins el la Universitato de Glasgovo.

Kvankam plantoj ne estas inteligentaj samsence kiel bestoj sed estas robotece antaùprogramitaj, ili havas tutan gamon da sensoj, kiu unuavide ŝajnas absurda. Kaŝtanarboj jam, fruseptembre, produktas siajn vintrajn burĝonojn, kio indikas, ke ili antaùvidas esceptan malvarmon. Ili mezuras la daùron de la noktoj - kelkaj plantoj kapablas tion je precizeco de kvin minutoj en 24 horoj. La "muŝkaptilo venera" kapablas nombri ĝis du. Tion la profesoro atestis per unuĵoja tuŝo per nadlo interne de unu el ĝiaj buŝecaj folioj. Nenio okazis, sed kiam li duan fojon ĝin tuŝis, ĝi fulmrapide kaptis sian predon tiel firme, ke li apenaù sukcesis retiri tiun nadlon. Tute logike, ĉar la

(blinda) planto voras nur insektojn. Unu tuŝo verŝajne signifas semon aŭ mortan objekton, kiun ĝi lasas reelfali. Dua tuŝo nepre indikas insekton. "En tio ĝi superas la komputorojn", diras la profesoro, "ĉar ĉi tiuj nur povas elekti inter nulo kaj unu". Antaŭ ol engluti sian predon, la muŝkaptilo venera "gustumas" ĝin; se ĝi ne estas nutriva, la folio reelsputas ĝin.

Iuj plantoj scias "paroli" sian deziron por akvo. En Kalifornio, la vitkulturistoj ekspluatas tion instalante sonsentilojn por registri plendoklakojn, kiuj fontas el la interno de la vitoj. Detektinte la klakojn, aŭtomata akvuma sistemo enŝaltas sin.

Aliaj plantoj havas ian vidpovon, kiu distingas kolorojn. Laktukosemoj garditaj dum tri tagoj en mallumo komencas ĝermi dek sekundojn post surverŝo per ruĝa lumo.

John RAPLEY (resumo el Daily Telegraph)

KARIKATUROJ

LA ORGANIZANTO

JULIO BAGHY

Post dekduhora baraktado en triaklasa kupeo de la plej malrapida "rapidvagonaro" de la mondo, fine mi sukcesis enlitiĝi. La silento de la hotelĉambro min enlulis; mi jam fermis la palpebrojn, kiam, ve... energia frapo sur la pordo... La palpebroj malfermiĝis kaj terurite mi vidis, ke en la kadro de la pordo aperas du metrojn alta larĝŝultra atleto. Frostotremo kuris tien reen sur mia dorso... Feliĉe, ke la atleto havis mildan rideton ĉe la lipoj, mieldolĉan mienon kaj ĉielbluajn revemajn okulojn, ĉar tio forpelis miajn unuajn pensojn: malgranda hotelo, mi estas eksterlandano, tutmonda krizo, oni supozas, ke eksterlandano portas kun si almenaŭ unu milionon, ktp. Poste venis la penso, ke verŝajne la hotel-servisto deziras preni miajn ŝuojn por purigi. Nu bone, li prenu! Mi estis turnonta min al la muro, kiam la atleto ekparolis.

-Kara majstro, bonan matenon!

-Unue, mi ne estas majstro; due por mi nun komenciĝas la nokto, kara samideano," mi respondis iom akre kaj bedaŭris, ke la vizitanto ne estas bandito, kiu kontentiĝus per la alproprigo de mia plata monujo kaj poste lasus min dormi. Dormi... dormi... ho, dormi!!!

- Ĉu mi ĝenas vin?

-Ho tute ne! (kaj mi malbenis la etiketon). Sed kara samideano, vi certe komprenos, ke la dumnokta vojaĝo, la preparĝo por la vojaĝo kaj... Kion mi diru al vi? Mi estas iomete tre laca.

-Kredeble, kara majstro. Mi ne miras," li diris kaj preninte seĝon li trankvile eksidis.

-Mi ne estas majstro.

-Bone, bone, mi scias, kion oni decas scii. Mi scias, ke vi estas...

Li ekparolis flate dorlote, sed la incensfumo de la belaj frazoj ne atingis mian komprenon. Ho, dormi... dormi, nur dormi!... Miaj tempioj nerve pulsis. La okuloj brulis pro maldormo.

-Vere, vi aspektas tre laca, kara majstro.

-Ĉu ne? kaj vekiĝis espero en mi, ke mia vizitanto baldaŭ forlasos min. "Jes efektive mi estas iomete laca kaj la kapo...

-Ĉu ĝi doloras?

-Nur iomete, sed tio ne gravas... Verdire, la vojaĝo ne estis agrabla kaj mi sentas rigidiĝon en mia tuta korpo.

La okuloj de la vizitanto ĝoje ekbrilis kaj per subita gesto li deprenis de si la jakon, suprenfaldis la manikojn de la ĉemizo kaj mi vidis tiajn muskolojn, kiajn eĉ lukto-ĉampiono devas respekti ĉe sia kontraŭulo. Pro miro la demando haltis en mia gorĝo. Teruraj scenoj el bulvardromanoj zigzagis en mia kapo. Li ridetis afable kaj proksimiĝis al mia lito.

-Ĝustatempe mi venis.

-Ĉu vi pensas," respondis mia ĝemo.

-Vi devas scii, ,kara majstro, ke mi estas diplomita masaĝisto," kaj li faris manmovon, kiu rememorigis min pri la cirkaj atletoj. Sed antaŭe mi estis buĉisto.

-Ne diru! Ĉu vere?, kaj la frostotremo komencis kankandancon en mia dorso.

-Sed mi abomenas la sangon. Mi heredis la karakteron de mia patrino. Ŝi estas laktovendistino. Jes, kara majstro, se vi ŝatas la kremon...Nu, iun tagon mi devis forlasi la buĉejon por komenci mian militservon. En la armeo mi estis en la Roto de la Milita Ruĝa Kruco kaj baldaŭ oni rimarkis mian talenton en la arto de la flegado. Do, tie mi lernis la masaĝistan metion, kiu absolute kontentigas min. Ĉar, kara majstro...

-Mi ne estas majstro, jam mi...

-Mi scias, kion oni devas scii. En la roto ni lernis la flegadon sub gvidado de kuracistoj

(sekvo sur paĝo 13)

KALOCSAY

LA GRAMATIKISTO

La verkisto Kalocsay estas plej ofte laùdata pro sia poezia verko, kiu estas precipe traduka. Sed pri tio mi ne parolos pro du kialoj, kiujn mi rapide mencios. Kiam mi estis nova esperantisto, iu lionano propagandcele publikigis diversajn tradukojn de la verko de Verlaine "Aùtuna kanto". Tuj mi aùdis, ke inter la tri tradukoj tie publikigitaj, nur unu redonis la muzikon de la franclingva poemo: tiu de Kalocsay. Kaj de tiam mi senrezerve admiris tiun poeton. Sed antaù nelonge mi legis en la libro de Piron: "La bona lingvo", plurajn tradukojn de la sama poemo, kie estas la muziko de Verlaine sed kun pli fidela traduko de la bildoj. De tiam mi dubas pri mia unua fervoro rilate al Kalocsay. Sed la dua motivo estas multe pli grava. En Univerla Kongreso, sine de la Kongresa Universitato, William Auld parolis pri poezio. Je la fino iu naivulo petis, ke la poetoj skribu en lingvo komprenebla por la popolo. Tiam Auld respondis, ke la poezio estas rezervita al malgranda elito, kaj ke kiam iu homo ne komprenas poezion, tio pruvas tutsimple, ke li ne apartenas al la poezia elito. Mi tuj komprenis, ke mi, kiu tre ofte ne komprenas poezion estas nekapabla paroli pri poezio kaj pro tio mi tute ne parolos pri la "Eterna bukedo", pri la "Tutmonda sonoro", "Streĉita kordo"... mi tute ne kompetentas.

Restas do la gramatiko, kies studon mi tre ŝatas... kaj ĝis nun neniu diris al mi, ke ĝi estas rezervita al malgranda elito, el kiu mi estus forĵetinda. Kompreneble, la plej grava verko tiutema estas la "Plena Gramatiko", sed ĉar tiun verkon pretigis du homoj, estas relative malfacile tutcerte diri, kion verkis Kalocsay. Tial mi referencos al du verkoj, kies nediskutebla aùtoro estas Kalocsay: " Lingvo, stilo formo" unue eldonita en 1931 kaj "Vojaĝo inter la tempoj" publikigita en 1966.

En la unua verko troviĝas diversaj ĉapitroj, kiuj ne rilatas al gramatiko, sed pli ĝuste al tiu poezio pri kiu mi ne kompetentas. restas la tiel nomataj: "Sendemandaj respondoj" kaj ĉefe la "Esperanta vortfarado". Pluraj temoj de la Sendemandaj respondoj" rilatas ne al gramatiko, sed pli ĝuste al leksikologio; ili estas: la duoblaj konsonantoj, la virinaj nomoj, la "de-familio" kaj la uzo de "ci". La problemoj vere gramatikaj kelkfoje retroviĝas en la Plena Analiza Gramatiko (PAG) kaj mi citos: la uzon de la artikolo, la uzon de kvazaù, la uzon de la u-modo en subjunkciaj propozicioj pri kiuj oni retrovas en PAG, la ideojn unue esprimitajn en la libro de Kalocsay. Krome estas la problemo "ata/ita", kiu estos la temo de la alia libro "Vojaĝo inter la tempoj" Restas nun kelkaj artikoloj, kiuj ŝajnas al mi sufiĉe apartaj por esti menciitaj ĉi tie, ĉar ili prezentas la vidpunkton de nia aùtoro.

La distingo inter "iu" kaj "ia" (kiu valoras pri neniu kaj nenia) estas pli preciza ol en PAG, kaj tute klare esprimita: la "u-vortoj" estas distingiloj sine de iu aro pli malpli klare aludita, dum la "a-vortoj" montras absolutan nedifinecon. Mi persone opinias, ke la klasado de la "u-vortoj" inter la pronomoj en PAG, kaŝas tiun rimarkon, kiu speciale valoras, kiam la "u-vortoj" (iu, kiu, tiu...) estas uzataj kiel adjektivoj,

La artikolo pri la sinsekvo de la vortoj modeste titolita: "iom pri la vortsekvo" estas tre simple klarigita, bone ilustrita per taùgaj ekzemploj, sed montras nur kelkajn situaciojn, dum la problemo, multe pli ĝenerale, rilatas ankaù al aliaj vortoj: "ankoraù", "nur"... La regulo ne estas sufiĉe ĝenerale esprimita.

La problemo de la vortfarado estas tie pritraktita en 41 paĝoj, dum en PAG, ĝi ampleksas 157 paĝojn. fakte, ŝajnas, ke la artikolo en "Lingvo, stilo, formo" estas la kerno de la pritraktado en, unue, la Plena Gramatiko kaj nun en PAG. Oni povas legi en "Lingvo, stilo, formo": "La tute detala pritrakto de la Esperanta vortfarado kun tre multnombraj ekzemploj, ampleksus dikan libron". Cetere oni povas legi en PAG multajn citaĵojn pri kritikoj, kaj respondojn al tiuj kritikoj. Do ni restu ĉe nia kerno, por rapide trarigardi pri kio temas.

Unue la aùtoro citas Zamenhof, de Saussure kaj Wüster, kiel fontojn de sia teorio: 1) la radikoj havas gramatikan karakteron (substantivan, adjektivan aù verban): hom', martel', bon', bel', skrib', leg'. 2) la gramatika karaktero de la vortoj dependas de la finaĵoj, kiuj povas esti pleonasmaj, aù funkcii kiel sufiksoj: martelo-marteli, bela-belo, skribi-skriba. 3) La gramatikan karakteron de la radiko ni ŝanĝas per ŝanĝo de la finaĵo: rapida-rapid(ec)o

(o: nomo de kvalito); legi-leg(ad)o (o: nomo de ago); patro-patra; timi-tima (a: kvalito, rilato); martelo-marteli (agi per martelo); sana-sani (esti sana); rapida-rapidi (agi rapide). 4) Reversebleco: homo => homa=> homeco => homeca= homa. En tiuj ekzemploj, la sufiksoj estis uzitaj nur por ebligi la prononcon de vortoj, kiuj teorie estus: homao= homeco kaj martelio= martelado. El tiuj principoj la aùtoro tiras du ĝeneralajn regulojn, kies aplikojn li detale studos. Tiuj reguloj estas: a) en vortkunmeto la ĉefa vorto staras en la fino: ĝi estas la ĉefelemento. La aliaj elementoj estas la flankelementoj. b) La gramatika karaktero de la ĉefelemento difinas ne nur la karakteron de la kunmetita vorto, sed ankaù tiun de la flankelementoj.

Poste, la aùtoro detale aplikas tiujn regulojn en multaj okazoj; survoje li malkovras la inversan vortefikon, proponas metodojn de analizo kaj fine li skribas:" ... mi volis montri, kiajn komplikitajn vojojn oni iras senkonscie dum la kunmeto de vortoj en Esperanto. Sed por paroli perfekte la lingvon, ĵute ne necesas, ke oni lernu parkere ĉiujn ĉi regulojn kaj analiz-metodojn. Sed se vi prenos la ne malgrandan penon de ilia trastudo, mire vi rekonos, kiel malfacilajn vojojn vi iradis ĝis nun, ne rimarkante ĝiajn krutaĵojn kaj serpentumadojn." Tiun sistemon aperis en 1935 en la unua eldono de la "Plena Gramatiko".

Inter 1965 kaj 1967, la Akademio de Esperanto akceptis, sub formo de dek-sep konstatoj la sistemon de Kalocsay, kiu kunlaboris en la redaktado de tiu oficiala dokumento. Tamen multaj kritikis kaj kritikas tiun teorion, precipe oni ne akceptas la gramatikan valoron de la radikoj. En la lasta eldono de PAG, Waringhien (post la morto de Kalocsay) skribis: "Ni avertas: la reguloj prezentotaj ne estas unuanime akceptitaj de gramatikemuloj. Tamen, por trankviligo, ni certigas la studonton, ke la kontraùbatalantoj de la eksplicita sistemo ne ellaboris ĝis nun alian sistemon akcepteblan, kaj ke ankaù ili mem uzas la lingvon laù la ĉi-sekve starigitaj reguloj. Ĉi tiuj reguloj ja simple konstatas la Zamenhofan kaj ĝenerale kutiman manieron de vortfarado kaj ili baziĝas ankaù sur pluraj signoj troveblaj en la Fundamento." Oni rimarkos, ke Waringhien uzas la vorton "konstato", kiu estas la kerno de la akademia dokumento.

La alia libro, kiun mi studos ricevis la titolon: "Vojaĝo inter la tempoj"; ĝi estis eldonita en 1966, kaj ĝi estas polemika libro. Oni povas opinii, ke la distingo inter la du uzoj de la pasivaj participoj komenciĝis en 1891, sed la "batalo" naskiĝis nur en 1932, kiam Waringhien prezentis sian klasadon de la verboj laù la daùro kaj la rezulto. Sed la afero restis je la nivelo de diskutoj ĝis 1958, kiam aperis la tria eldono de la Plena Gramatiko. De tiam kaj ĝis 1967 okazis grava lingva batalo inter la akademianoj. Pluraj homoj publikigis librojn pri tiu temo, kaj la libro de Kalocsay estas unu el ili. Ĉar temas pri polemika libro, sufiĉe grandan parton de ĝi okupas kritikoj de aliaj aùtoroj, aliaj libroj. Nun tiuj tiamaj argumentoj eksmodiĝis, sed la batalo daùras inter la du manieroj uzi la pasivajn participojn, kiam la helpverbo estas "esti". Sed por 1991, ne tre gravas la argumentoj de 1960-1966; multe pli interesa estas la maniero laù kiu Kalocsay studis kaj prezentis la problemon.

Li unue rememoris la klasadon de la verboj laù Waringhien, kiun oni povas tiel resumi:
1) Verboj, kiuj montras agon, kiu ne kondukas al rezulto. Oni povas nomi tiujn verbojn **senrezultaj verboj aù imperfektaj verboj.** Oni rimarkos, ke tiuj verboj estas ĉiuj **daùraj verboj.** Sed en tiu klaso ekzistas du subklasoj, kiuj estas: 11) la verboj , kiuj esprimas iun agon, kies celo estas en la ago mem, kaj kiujn oni povas nomi **memcelaj verboj.** Ekz.: abomeni, admiri, adori...ami, bedaùri...funebri, respekti, scii... 12) la verboj, kiuj esprimas iun agon, kiu kondukas al rezulto esprimita per alia verbo kaj kiun oni povas nomi: **preparativaj verboj.** En la listo, kiun mi prezentos, mi aldonos parenteze la rezult-verbon. Ekz.:(aspiri (akiri), celi (trafi), kurac ,sanigi), peli (forpeli), persekuti (kapti), peti (ricevi), serĉi (trovi).
2) Verboj, kiuj montras agon, kiu kondukas al rezulto esprimita per la sama verbo, kaj kiujn oni povas nomi: **kunrezultaj verboj aù perfektivaj verboj...** Tiuj verboj kun rezulto dividiĝas en du kategorioj: 21) verboj **kun rezulto sen daùro.** El tiu verboklaso ekzistas du kategorioj:
221) la verboj,kiuj montras la rezulton de alia verbo nomata preparativa verbo, kaj kiujn oni povas nomi pro tio: **terminativaj verboj.** Oni trovos ekzemplojn en la paragrafo (12).
222) la verboj, kies sendaùreco estas montrata per la prefikso "ek", kiel estas: eklumi, ekbrili, ektremi...
22) La verboj kun rezulto kaj daùro, kiujn oni povas nomi: **kompletaj verboj.** Ekz.: legi, skribi, konstrui...

Poste, neglektante la argumentojn, kiuj rilatas al la tiama diskuto, mi transiros al lia plej originala studo, laù mia opinio, tio estas la ĉapitro, kie li difinas la prezencon, kaj kies titolo estas: "La signifo de la verbaj finaĵoj". Li montras, ke, kiam oni difinas la gramatikan "tempon" rilate al la nuno, estas facile difini la pasintan tempon aù "is-tempon" kaj la estontan tempon aù "os-tempon". La nuno estas ĝuste la limo inter tiuj du partoj de la fizika tempo. Sed kio estas la prezenco? Kaj li klarigas per skemo, sian komprenon de la prezenco:

.....havos.....K.....havas.....F.....havis....
N

La as-tempo komenciĝas ĉe la litero "K" (komenco) kaj daùras ĝis la litero "F" (fino). Kiam oni sekvas la sagon, antaù la komenco K estas os-tempo (futuro), inter K kaj F estas as-tempo (prezenco); post F estas la is-tempo (preterito). Sed tre grava afero, inter K kaj F oni povas uzi "is" por la punktoj inter K kaj N (la nuno), kaj "os" por la punktoj inter N kaj F. Tial la formo, kiun oni esprimas per "as" ne estas tempo; ĝi entenas "is+os", **ĝi ne estas tempo sed aspekto.** Tiu finaĵo de la konjugacio montras, ke la **priparolita ago (aù stato) estas komencita kaj ankoraù ne finita.** Ĝia esenca signifo estas la imperfekteco, tio estas la neatingo de la fino, de la rezultato. Alia grava konsekvenco: **oni povas uzi la prezencon, nur se la ago aù la stato daùras.**

Nun ni povas apliki tiun kvaliton al la prezencaj formoj de la participoj, kaj ni konstatas, ke "anta" = "komencinta-nefininta", kaj ke "ata" = "komencita-nefinita". "Kantanta knabo" estas knabo, kiu komencis kanti sed ankoraù ne finis, kaj "kantata melodio" estas melodio, kies kantadon oni komencis sed ankoraù ne finis. Sed oni atentu, ke tia signifo ne limiĝas en la tempo. Ekzemple, iu verkisto povas paroli, okaze de kunveno, pri sia verkata romano. Tio ne signifas, ke en la tuja momento la verkisto skribas, sed, ke li jam komencis
la verkadon de romano, kiun li ankoraù ne finis. Kaj parolante pri li, iu najbaro povas diri: "mi loĝas apud homo verkanta romanon" eĉ se en la sama momento la verkisto aĉetas florojn en butiko.

Poste Kalocsay studas la preteritajn participojn, kaj tiam nestas, laù mi, la tuta kerno de la batalo. Uzante denove skemon, la aùtoro montras la limon inter la uza de "ata"kaj "ita":

_0_1_2_3_4_5_6_7_8_9_1O_10_10_10_
K skribata F skribita

La ciferoj montras la elvolviĝon de la skribado, kaj je la punkto F estas la nombro 10, kiu poste ripetiĝas, kaj tio signifas, ke por Kalocsay la punkto F apartenas al la preterita tempo. Sed ni reparolos pri tiu tre grava punkto rilate al la praktiko.

Se oni komparas la ĵusan studon kun la klasado de la verboj, oni konstatas, ke:

1)**oni ne povas uzi la prezencajn participojn kiam la verbo estas sendaùra.** Ekzemple, iu perdita objekto estas unue **trovota** (tio signifas, ke oni celas ĝian trovon per serĉado), kaj subite la objekto fariĝas **trovita** sed neniam estis trovata (ĉar neniu estis, estas aù estos trovanta ĝin, aù pli simple neniu trovas ĝin; oni nur povas esti serĉanta kaj **tuj poste trovinta).**

2) Kiam la verboj estas memcelaj la preterita participo estas **ne preciza.** Ekzemple oni trovas en la proverbaro: "Mono havata estas pli grava ol mono havita". La vorto "havita" ricevas du signifojn: pozitivan: "kiun oni havis", kaj negativan: "kiun oni ne plu havas", do, "ne plu havata". La diferenco inter tiuj du signifoj aperas per la sekvanta ekzemplo: "Mortis en mizero la longe famekonita aktoro, s-ro **N.**". Oni povas kompreni la frazon dumaniere:

21) "Mortis en mizero la iam longe famekonata aktoro..."

22) "Mortis en mizero la delonge ne plu famekonata (delonge forgesita) aktoro."

Tial **estas konsilinde ne uzi tiujn preteritaj participoj.**

3) Kiam la verboj estas **preparativaj**, ili akceptas nur la prezencajn participojn (ĉar ne estas rezultato), kaj kiam la verboj estas **terminativaj** ili akceptas nur la preteritajn participojn (ĉar ili ne havas daùron). Ekzemple: la ŝlosilo longe **serĉata** estis **trovita** en la tirkesto.

4) La plej malsimpla situacio estas tiu de la **kompletaj** verboj, ĉar ili havas daùron, (oni povas uzi "ata") kaj rezulton, (oni povas uzi "ita"). Tiam la **praktikoj** estas ĝenerale samaj, krom en kompleksaj formoj: "estis...ata" kaj "estis... ita".

(daùrigota)

F. BOYET

LA AKVOTEMO EN LA NOBLA KORANO

Kiel la ceteraj Sanktaj Libroj, la Nobla Korano povas esti konsiderata laù du vidpunktoj: tiu de la kredanto, kiu nepre volas skrupule ricevi kaj fidele gardi la transdonitan mesaĝon, kaj tiu de la historiisto, kiu ekrilatiĝas dum difinita tempoperiodo kun difinita socio signita de difinita imagostoko. Ĉiel, la kiel eble plej objektivema leganto de sankta libro ne montriĝas pasiva: la transdonitan mesaĝon li devige ricevas trae de la socio, en kiu li vivas kaj estas nekonscie influata de ties imagostoko. Ekzemple: samtempulo de Mahometo, vivinta komence de la VII-a jarcento en Okcidenta Arabio - homo, por kiu la mesaĝo estis origine destinita- ne ĝin ricevis samkiel islamano du jarcentojn poste, en la momento, kiam ekzegezo jam disfloradis, aù kiel kredanto XV-a jarcenta, kiam apogeis la turka potenco, aù kiel homo niaepoka. Eĉ pli: nuntagaj islamanoj ekzemple marokanaj aù indonezaj iom malsammaniere ĝin perceptas.

Ni revenu al la komenciĝo de la VII-a jarcento, kiam la mesaĝon ricevis la Profeto mem. Ni ne forgesu, ke temas pri civilizacio de neskriba sed parola transdono. La Revelacio venis al Mahometo per du fojoj: la unuan fojon en Mekko, sine de lia propra tribo, kiu estis vivanta sur tiu krucvojo por karavanistoj, en regiono de senakvaj stepoj kaj montaroj; la duan fojon en Medino, kie, forpelite de Mekko, Mahometo rifuĝis ne en la sino de tribo unika, kiel en Mekko, sed meze de pluraj, inkluzive de Judoj.

Nu evidentas, ke en homgrupoj tiaspecaj, la akvotemo absolute ne estas perceptata, kiel povus okazi ĉe ni Okcidentanoj. Sekve, ni zorge evitu la transŝovon de nia propra imagostoko por provi ekkapti la koranan pensmanieron. La temo aperas en multaj suraoj. Por la tiamaj Araboj aparte gravis du nocioj inter si forte ligitaj: vojstreko kaj akvopunkto. Se oni misvojiĝas sur dezerta lando, la tuton oni perdas, inkluzive de la vivo, ĉar la kamelaro ne plu povas trinki kaj la kamelinoj ne plu donas lakton de la homoj trinkeblan. Tial venas neevitebla morto.

Akvo povas esti ĉu videbla, ĉu nevidebla. Eĉ ne parolante pri oazoj, ni diru, ke ununura arbo ie staranta signas akvon, ĉar, se iam nubo ne krevintus sur tiu preciza loko, arbo ne kreskus. Kiam en la Korano estas elvokataj paŝtejoj, nepre ne venu antaù niajn okulojn la bildo de altkreska verda herbo, sed prefere tiu de foje eta spaco, sur kiu videblas kelkaj florportaj graminacoj. Ni ja miras, kiam ni konstatas, ke tute male de ni, akvofonto estas negative perceptata. Kial? Ĉar la tutan regionon baras grandegaj bazaltaj ĥaosoj, tute nesupereblaj, kiujn la vojostrekoj estas devigataj ĉirkaùiri. Nur kelkaj sentimaj paŝtistoj aùdacas tie vagadi. Meze de tiu ĥaoso ŝprucas kelkaj akvofontoj, foje varmaj, sed ĉiam timigaj, ĉar kune kun fajrolangoj kaj vulkanaj fenomenoj. Kontraùe la akvo ŝatata kaj prisopirata desupras de la ĉielo. Ho pluvo!

Tiom gravas ĝi, ke en ĉiu tribo oni kalkulas lertulon, la rolon de antaùesploristo ludantan, kiu estas komisiita gvati la eventualajn nubojn sur la ĉielo ilin taksi pluvodonaj aù ne, kaj se jes, ilin postsekvi, rajdante sur la plej rapida kamelo por atingi la ĝustan lokon, kie ili estas krevontaj. Tiel homoj kaj bestoj povos sensoifiĝi.

Ni notu originalan belan komparon inter nubo, kies akvo desupras de la ĉielo, kaj kamelo surgrunde surgenuiĝanta.. estas rimarkinde, ke la Korano preskaù konstante parolas pri desupranta akvo. Alaho akvon desuprigas, por ke la homnutraĵo povu kreski kaj la arboj frukti. El tio fontas la komparo inter la akvo de Alaho desuprigata kaj la Revelacio de Li ankaù desuprigata, por ke la homanimo povu sin nutri per ĝi.

Gravaj kaj originalaj ankaù la ideoj pri "mortinta grundo" kaj "vivanta grundo". Mortinta grundo jam ne plu estas vizitata de la pluvo; tial malfekunda ĝi fariĝis. Male, se ĝi estos denove vizitata de bonefika ĉielakvo, ĝi reviviĝos.. Tio klarigas la komparon kun la homa reviviĝo, aù releviĝo. Simila nocio legeblas en la Biblio. Notindas multaj similaĵoj inter ambaù Sanktaj Libroj, kvankam sub malsama vesto. En la Biblio sintezaj estas la rakontoj-ekzem-

ple pri la kreado de la universo-, dum en la Korano aperas sinsekvaj rakonteroj: ekzemple la nocio pri paradizo preciziĝas laùlonge de pluraj tekstoj. En la komenco ĝi estas preskaù nebula; poste konstruiĝas la bildo de laùbego kun tiel dika foliaro, ke la suno ne povas enŝoviĝi. La feliĉego konsistas el tio, ke la justulo rajtas resti senmova, ŝirmita de arda suno. Ja kulmino de feliĉo por nomadoj, konstante devigataj vagi sur la vojostrekoj!

Se la paradizon la Korano prezentas, kiel vastan ombrodonan laùbon, la infera loko ne similas tiun de nia mezepoka tradicio. Se temas ĉi tie pri fajro, tio estas la sunofajro, sub kies ardego estas turmentata solulo, senigita je la helpo de samtribanoj, sub plensomera sunego, je la tagmeza horo; por la malfeliĉulo la nura nutraĵo konsistas el amaraj beretoj por kamelo apenaù taùgaj, per kiuj li ne sukcesas plenigi al si la stomakon.

Aparte ŝatata estas la akvo el la irigaciaj kanaloj. Tion flustras la surao, kiu raportas pri puno sendita de Alaho al orgojlaj Jemenanoj, kiuj strebis trorapidigi la karavanan iradon kaj forgesis danki al Alaho pro la survoje ricevitaj bonaĵoj. Alaho permesis, ke dum ili vojadis, la digoj rompiĝu. La trairita lando estis do subakvigita kaj resovaĝiĝis la grundo jam ne plu taùga por ia ajn rikolto. Fakte plurfoje ripetiĝis similaj faktoj laùlonge de la Jemen-historio, sed en la Sankta Libro ili estas resumitaj per unu fojo, duonrakonto, duon-mito, por ilustri la dian punon.

Kompreneble, por eltiri la tutan sukon kaj religian kaj poezian el tiuj tekstoj bedaùrinde fremdaj por multaj el ni, estus necese ilin studi en la originala lingvo; bonega traduko de multaj piednotoj riĉigita, povus ankaù utili. tamen espereble la interesiĝo pri tiu skizita akvotemo povos instigi al pli da scivolemo.

(laù prelego en Sorbono)

S. BONIOL

INSTRU - HELPILO

Praktikigo de la lingvo en kurso ne ĉiam estas facila. Tamen diversaj rimedoj ekzistas. Unu el ili konsistas en la elekto de iu nombro da radikoj kaj la uzado de vortoj konstruitaj surbaze de tiuj radikoj, en teksto libere verkita. La gvidanto povas fiksi difinitan nombron da uzotaj diversaj gramatikaj formoj, aù lasi kompletan liberecon al la lernantoj. Jen ekzemplo (kurso dum Kultura Semajno en Sète en septembro 1994). La radikoj proponitaj de la kursanoj estis:: aĉ, tabl, arb, prav, pluv, azen, sci, polv, hak, ŝip, labor, pan, ĉiel, poŝt, incit, mar, har, ir, ŝrank.

"Mi ne scias ĉu nia instruisto pravis, sed mi estas incitata, ĉar li donis al ni aĉan laboron, preskaù azenan laboron. Mi devas resti en mia ĉambro, ĉe mia tablo; mi devas elŝrankigi mian polvokovritan vortaron. Se almenaù pluvus, se la ĉielo estus griza, mi ne dezirus iri en la proksiman arbaron, min bani en la maro aù rigardi la ŝipojn. Tordetante harfasketon, mordetante pecon da pano, mi ne sukcesas verki pri la hakilo de la poŝtisto." (G. LETZGUS)

"Kia aĉa vetero! Pluvas, pluvegas de pluraj tagoj, kvankam la poŝtisto, tiu senhara azeno, kiu incitas min per sia universala sciado, diras, ke tia vetero, en tiu sezono, ne povas daùri.
Mi rondiras en mia ĉambro, inter la ŝranko kaj la tablo zorge senpolvigitaj de mia edzino, sen ia rigardo al la arboj en mia ĝardeno, kiuj kutime tiel plaĉas al mi... Mi kolere rondiras, ĉar mi ne povas resti ĉi tie; mi devas iri sur la maron kaj sur mia ŝipo por perlabori la panon de miaj infanoj. Tie, la vizaĝo kaj la manoj hakitaj de pluveroj kaj de polvigitaj glacieroj pravigos la diron:" oni nenion havas sen peno!". Ĉiel pene labori estas tamen pli bone ol nenion fari". (F. CAYROL)



LA ERMITO

GUY DE MAUPASSANT

Ni iris viziti kun kelkaj amikoj la maljunan ermiton loĝantan sur malnova tombmonteto, kovrita de grandaj arboj, meze de la vasta ebenaĵo inter Cannes kaj La Napoule. Revenante ni parolis pri tiuj strangaj laikaj soluloj, multnombraj iam, kies speco hodiaŭ malaperas. Ni serĉis moralajn kaŭzojn, ni penis difini la specojn de ĉagrenoj, kiuj iam instigis la homojn loĝi en dezertoj. Unu el niaj konuloj diris subite:

"Mi konis du solulojn: viro kaj virino. La virino ŝajne ankoraŭ vivas. Ŝi loĝis antaŭ kvin jaroj en ruinaĵoj, supre de absolute dezerta monteto sur la Korsika marbordo, dekkvin aŭ dudek kilometrojn for de ĉiu ajn domo. Ŝi vivis tie kun servistino; mi iris viziti ŝin. Ŝi estis iam distingita, monduma virino. Ŝi akceptis min kun ĝentileco, eĉ kun afabla ĉarmeco, sed mi scias nenion pri ŝi; mi divenis nenion.

Koncerne la viron mi tuj rakontos lian teruran aventuron.

Turnu vin malantaŭen. Vi ekvidas tie tiun pintan kaj arbaran monteton, kiu videbliĝas malantaŭ La Napoule, tutsola antaŭ la pintoj de l'Esterel; en la regiono oni nomas ĝin Monto de Serpentoj. Tie vivis la solulo, inter la muroj de antikva templeto, antaŭ proksimume dekdu jaroj. Aŭdinte pri li, mi decidis konatiĝi kun li kaj mi forrajdis el Cannes iun matenon de marto. Lasinte mian ĉevalon en la gastejo de La Napoule, mi ekgrimpis tiun strangan konuson, cent kvindek aŭ ducent metrojn altan. Kovritan de aromaj kreskaĵoj, precipe cistoj, kies odoro estas tiel akra kaj penetrema, ke ĝi konfuzas kaj kaŭzas kvazaŭ sveneton. La grundo estas ŝtona kaj oni ofte vidas longajn kolubrojn, kiuj glitas sur la ŝtonetoj, kaj malaperas en la herbojn. Pro tio la monto havas la pravan kromnomon de la Serpentoj. La rampuloj ŝajnas naskiĝi sub la piedoj, kiam oni surgrimpas la deklivon, elmetitan al sunbrilo. Ili estas tiel multnombraj, ke oni ne kuraĝas marŝi, kaj ke oni sentas strangan ĝenon, ne timon, sed specon de mistika teruro. Mi havis plurfoje la strangan impreson suprengrimpi la antikvan sanktan monton, strangan, parfumitan kaj misteran monteton, kovritan de cistoj kaj loĝatan de serpentoj kaj kronitan per templo.

Tiu templo ankoraŭ ekzistas. Oni ja certigis al mi, ke tio estis templo. Sed mi ne klopodis ekscii plion por ne difekti miajn revojn. Do mi grimpis tien, iun matenon de marto, sub la preteksto admiri la pejzaĝon. Atinginte la supron mi fakte ekvidis murojn kaj viron sidantan sur ŝtono. Li ne estis multe pli ol kvardek-kvin jara, kvankam liaj haroj estis tute blankaj, sed lia barbo restis preskaŭ nigra. Li karesis katon, ronde kuŝantan sur liaj genuoj, kaj ŝajne ne atentis pri mi. Mi rondiris tra la ruinoj, kies unua parto, tegmentita kaj fermita per branĉoj, pajlo, herbo kaj ŝtonoj, estis loĝata de li, kaj mi revenis al lia flanko.

De tie la vidaĵo estas admirinda. Dekstre estas l'Esterel kun pintaj supraĵoj, strange eltranĉitaj, poste la senmezura maro, etendiĝanta al la malproksimaj, italaj bordoj, kun ĝiaj multaj terpintoj, kaj kontraŭ Cannes la insuloj de Lerins, verdaj kaj plataj, kiuj ŝajnas flosi, el kiuj la lasta prezentas al la plenmaro altan, malnovan kastelon kun dentitaj turoj, konstruita en la ondoj mem. Poste stariĝas la Alpoj, kies pintoj estas ankoraŭ kapuĉitaj de neĝo. Ili superstaras la verdan bordon, sur kiu, de tiel malproksime, oni vidas, simile al sennombraj ovoj, demetitaj laŭlonge de la bordo, la longan rozarion el vilaoj kaj blankaj urboj konstruitaj meze de arboj. Mi murmuris: "Kristo, estas bele!".

La viro levis la kapon kaj diris: "Jes, sed se oni vidas tion la tutan tagon, estas unutone..." Do li parolis, li babilis, kaj li enuis, mia solulo! Mi do povis ion ekscii. Mi ne restis longtempe tiun tagon, kaj mi nur klopodis trovi la specon de lia homevitemo. Li precipe ŝajnis al mi estaĵo laca je la aliaj kaj je ĉio, senhelpe seniluziigita, kaj tedita de si mem, kiel de la cetero. Mi forlasis lin post duonhoro da interparolado. Sed mi revenis ok tagojn poste kaj ankoraŭ unufoje la sekvintan semajnon, poste ĉiusemajne; la rezulto estis, ke ni fariĝis amikoj antaŭ du monatoj.

Nu, iun vesperon fine de majo, mi opiniis ke la taŭga momento venis, kaj mi kunprenis manĝaĵojn por vespermanĝi kun li sur la Monto de Serpentoj. Estis unu el tiuj sudaj vesperoj, tiel odoraj en tiu lando, kie oni kulturas florojn same kiel oni kulturas tritikon en la Nordo, en tiu lando, kie oni fabrikas preskaŭ ĉiujn esencojn, kiuj parfumas la virinajn karnojn kaj robojn,- unu el tiuj vesperoj, dum kiu la spiroj de la sennombraj oranĝarboj, plantitaj en la ĝardenoj kaj ĉiuj valetaj sulkoj, malserenigas kaj sopirigas je amorevoj eĉ maljunulojn.

Mia solulo akceptis min kun videbla ĝojo; li volonte konsentis partopreni mian vesper-

manĝon. Mi trinkigis al li iom da vino, kion li ne plu kutimis; li pli vigliĝis kaj ekparolis pri sia antaùa vivo. Li ĉiam loĝis en Parizo kaj vivis, kiel gaja fraùlo, ŝajnis al mi. Mi demandis lin neatendite: "Kian strangan ideon vi havis venante loĝi sur ĉi tiu pinto?" Li respondis tuj: "Ha! ĉar mi havis la plej akran emociegon, kiun homo kapablas percepti. Sed,kial mi kaŝus al vi tiun malfeliĉon? Ĝi igos vin kompati min, eble! Kaj... mi neniam tion diris al iu... neniam... kaj mi volus scii... unu fojon... kion alia pensas pri tio... kaj kiel li tion prijuĝas..

"Mi naskiĝis en Parizo, mi estis edukata en Parizo, mi grandiĝis kaj vivis en tiu urbo. Miaj gepatroj postlasis al mi renton de kelkaj miloj da frankoj, kaj mi ricevis, per protekto, modestan kaj trankvilan oficon, kiu, ĉar mi estis fraùlo, igis min riĉa. Mi pasigis ek de mia viriĝo, fraùlan vivon. Vi scias, kio ĝi estas. Libera kaj senfamilia, decidinte ne havi leĝan edzinon, mi pasigis de tempo al tempo tri monatojn kun unu, ses monatojn kun alia, poste unu jaron sen kunulino, elektante el la amaso da preneblaj aù aĉeteblaj knabinoj Tiu malboneta kaj banala vivo preskaù plaĉis al mi kaj kontentigis miajn denaskajn inklinojn al ŝanĝo kaj sencelaj promenadoj. Mi vivis sur la bulvardoj, en teatroj kaj kafejoj, ĉiam ekstere, preskaù senloĝeje kvankam mi havis decan hejmon. Mi estis unu el tiuj miloj da estaĵoj, kiuj kvazaù korkoj lasas sin flosigi en la vivo; por kiuj la Parizaj muroj estas la muroj de la tuta mondo, kaj kiuj havas zorgojn pri nenio, ĉar ili havas pasion por nenio. Mi estis, kion oni nomas bona tipo, senbonkvalitoj kaj sen miskvalitoj. Jen! Kaj mi juĝis min senerara.

Do, de dudek ĝis kvardek jaroj, mia vivo fluis malrapide kaj rapide sen grava okazaĵo. Kiel ili rapidas, la unutonaj Parizaj jaroj, dum kiuj neniu epokfara rememoro eniras la spiriton, tiuj longaj kaj rapidaj jaroj, banalaj kaj gajaj, dum kiuj oni trinkas, manĝas kaj ridas, nesciante pro kio, kun lipoj etenditaj al ĉio gustumebla kaj al ĉio kisebla, sen deziro al io ajn! Mi estis juna, mi fariĝis maljuna, ne farinte, kion la aliaj faras, sen ia ajn amligeco, sen enradikiĝo, sen rilatoj, preskaù sen amikoj, sen parencoj, sen edzino, sen infanoj.

Do mi trankvile kaj rapide fariĝis kvardekjara, kaj por festi tiun datrevenon mi regalis min mem per bona vespermanĝo en granda kafejo. Mi estis solulo en la mondo; mi opiniis amuze festi tutsole tiun daton; post la manĝo mi hezitis pri la sekvo. Mi ekdeziris iri en teatron; poste mi havis la ideon pligrimi al la "Latina Kvartalo", kie mi iam studis la jursciencon. Mi do trairis Parizon kaj eniris sen antaùdecido en unu el tiuj biervendejoj, kie knabinoj alportas la trinkaĵojn. Tiu, kiu atentis pri mia tablo, estis tute juna, beleta kaj ridema. Mi proponis al ŝi trinkaĵon; ŝi tuj ĝin akceptis. Ŝi sidis antaù mi kaj rigardis min per siaj ekzercitaj okuloj, por scii pri kiaspeca viro temas. Ŝi estis blondulino aù pli bone blondetulino, freŝa, tute freŝa estaĵo, kiun oni divenis rozkolora kaj diketa sub la ŝvelita korsaĵa ŝtofo. Mi diris al ŝi la amindumajn kaj malspritajn aferojn, kiujn oni ĉiam diras al tiuj estaĵoj; kaj, ĉar ŝi estis vere ĉarma, mi subite havis la ideon ŝin forpreni... tio ankaù por festi mian kvardekjarecon. Ne daùris longe, nek estis malfacile; Ĝuste ŝi estis libera... de dekkvin tagoj, ŝi diris al mi... kaj ŝi unue akceptis veni noktomanĝi kun mi en la Haloj, kiam ŝia servado estos finita. Ĉar mi timis, ke ŝi malplenumoş la rendevuon, -oni ne scias, kio povas okazi, nek, kiu povas eniri en tiujn bierejojn, nek, kiu vento povas blovi en virina kapo-, mi restis tie la tutan vesperon por ŝin atendi. Ankaù mi estis libera de unu aù du monatoj kaj mi demandis al mi, rigardante iri de tablo al tablo tiun infanĉarman novulon de l'amo, ĉu ne bone estus fari aranĝoŋ kun ŝi por kelka tempo. Mi rakontas al vi unu el la banalaj ĉiutagaj aventuroj de la vira vivo en Parizo. Pardonu al mi tiujn maldelikatajn detalojn; tiuj , kiuj ne amis poete, prenas kaj elektas la virinojn, kiel oni elektas kotleton en la buĉejo, okupiĝante nur pri la kvalito de ilia karno. Do mi kondukis ŝin en ŝian ĉambron. Estis laboristina loĝejeto, pura kaj malriĉa, sur la kvina etaĝo; mi pasigis tie du ĉarmajn horojn. Tiu junulino havis maloftajn allogon kaj ĉarmon.

Forironte mi iris al la kameno, por tien meti la kutiman donacon, post kiam mi fiksis duan renkonton kun la knabineto, kiu restis en la lito; tiam mi malprecize vidis horloĝon sub kloŝo, du florvazojn, kaj du fotografaĵojn, el kiuj unu, tre malnova estis survitra kopio, nomita "dagerotipo". Mi hazarde kliniĝis al tiu portreto kaj mi restis konfuzita, tro surprizita por kompreni... Estis mia, la unua el miaj portretoj... kiun mi farigis iam, kiam mi studente vivadis en la "Latina Kvartalo". Mi subite prenis ĝin por pli atenta ekzameno. Mi ne eraris... kaj mi havis emon ridi, ĉar tiu

trovo estis tiel neantaùvidita kaj gajige stranga. Mi demandis : "Kiu estas tiu sinjoro?". Ŝi respondis: "Estas mia patro, kiun mi ne konis. Patrino lasis tiun portreton al mi kaj diris, ke mi ĝin konservu, ke eble ĝi iam utilos al mi...". Ŝi hezitis, ekridis kaj rediris: "Mi cetere ne scias por kio ĝi povus utili al mi; mi pensas, ke mia patro ne venos min leĝe filiniĝi..." Mia koro batis rapidege, kiel la galopo de timfuriozi-ĝinta ĉevalo. Mi remetis la bildon, kuŝigante ĝin sur la kameno, metis sur ĝin, eĉ ne sciante kion mi faris, du banknotojn centfrankajn, kiujn mi havis en la poŝo kaj forkuris kriante: "Ĝis baldaù, ĝis la revido, karulino mia, ĝis la revido!". Mi aùdis, ke ŝi re'spondas: "Ĝis mardo!". Mi estis sur la malluma ŝtuparo, kiun mi malsupreniris esplorpalpante. Kiam mi eliris, mi konstatis, ke pluvas, kaj mi foriris grandpaŝe.

Mi iris antaùen, frenezeta, konsternegita, serĉante rememorojn. Ĉu eble? Jes, mi subite rememoris pri knabino, kiu skribis al mi ĉirkaù unu monaton post nia disiĝo, ke ŝi estas graveda de mi. Mi disŝiris aù bruligis la leteron kaj forgesis la aferon. Mi estus devinta rigardi la fotografaĵon de la virino. Sed ĉu mi estus ŝin rekoninta? Mi atingis la kajon. Mi vidis benkon kaj mi sidiĝis. Homoj pasis de tempo al tempo. La vivo ŝajnis al mi abomeninda, plena de mizeroj, hontoj, Mia filino! Mi ĵus seksposedis, eble, mian filinon! Kaj Parizo, tiu granda malluma, malbrila Parizo estis plena de tiaj aferoj, adultoj, sangadultoj, perfortaĵoj. Mi agis, ne sciante kaj nevole, pli malbone ol tiuj malnoblegaj estaĵoj. Mi eniris la liton de mia filino! Mi preskaù volis min ĵeti en la akvon. Mi estis freneza. Mi vagadis ĝis la sunleviĝo kaj poste revenis hejmen por pripensi. Mi faris tiam, kio ŝajnis al mi plej saĝa. Dirinte, ke mi estas komisiita, mi petis notarion enketi pri la naskiĝo de la junulino. Kiam ŝi mortis, la patrino estis nominta la patron de sia filino antaù pastro. La patro estis mi. Poste mi transdonigis al la junulino la duonon de mia havaĵo, kies renton ŝi ricevas. Mi eksiĝis el mia ofico. Vagante laù tiu marbordo mi trovis ĉi tiun monteton kaj mi haltis... ĝis kiam... mi ne scias!"

Mi forlasis mian solulon. Mi estis tre emociita de lia rakonto. Kiam mi revenis la sekvan jaron, la viro ne plu estis sur la monteto, kaj mi neniam plu aùdis pri li.

tradukis: R. RICHET

(sekvo de paĝo 5)

kaj ni lernis anatomion por ne erari dum la laboro. Vi povas fidi min. Via korpo estas travidebla por mi. Mi refreŝigos vin tute fakscie, ĉar vin bezonas nia movado kaj... Ĉu vi havas pudron? Nuntempe oni masaĝas uzante pudron.. Antaùe oni uzis oleon. Ĝi malpurigas la tolaĵon kaj krome ne incitas sanige la epidermon. Ĉu vi ne havas pleùriton. Estas grave scii dum masaĝo de la skapolaj muskoloj. Ĉu vi ne havas incititan renon? Estas utile scii dum la masaĝo ĉe la vertebra muskolaro. Nu, bone, kaj nun...

Kaj nun komenciĝis mia torturado. Efektive mi refreŝiĝis, ĉar la dormodeziro estis forpelata. Mia bonkora samideano parolis kaj parolis, dolorige ilustris sur mi la erarojn de la malnova masaĝarto, poste milde demonstraciis pri la novaj progresoj. Knedante min, li klarigis al mi la nomon kaj destinon de ĉiu muskolo kaj, intertempe, akompanate de miaj veoj, dolorsibloj, li malkaŝis la celon de sia vizito..

-...kaj malgraù tio, ke mi estas nur komencanto, tamen mi konstatas, ke en la movado ne ĉio estas en ordo. Mankas la nepre necesaj organizaĵoj. Precipe mankas fakorganizaĵoj. Por ekzemplo, al kiu organizaĵo povus aparteni mi laù mia profesio? Mi turnis min al la gvidantoj, sed ili ne respondis. Fine mi eksciis ke la fakorganizaĵo de la masaĝistoj ankoraù mankas en nia movado. Longe mi pripensis tiun ĉi mankon kaj subite venis la ideo, ke ĝuste tiu fako estus la plej utila por nia movado. Ĝi estus la refreŝiga taĉmento por niaj lacaj pacaj batalantoj.

-Hahaha! Hihihi! Bruhahahaha!

-Kio okazis?

-Mi estas iom tiklema...Certe, tio estas bonega ideo!

-Ĉu ne! Ankaù vi trovas la ideon brila! Prezentu al vi, kiom da utilo alportus I.O.M.

-Iom?!!... Ho, jes, certe, iom... jes iom ĝi alportus.

-Vi bonvolis miskompreni min. Ne iom, sed I.O.M., Internacia Organizaĵo de Masaĝistoj. Cetere mi ankoraù ne decidis pri la definitiva titolo. Oni povus nomi la novan organizaĵon I.O.M.E. por havi simbolon pri la maniero kaj precizigi la esperantistan karakteron.


-Kion vi pensas pri Masaĝista Organizaĵo Refreŝiga kaj Tutmonda. En la titolo oni retrovas promeson kaj efikon: M.O.R.T.

-Hahaha! Kara majstro, vi bonvolas ŝerci. Jen la efiko de la masaĝo. Vi refreŝiĝis, vi havas bonhumoron... Espereble vi subtenos mian ideon ĉe la instancoj de nia movado.

-Tre volonte! Mi rekomendos vian servon al la membroj de la komitato. Ili estas vere lacaj pacaj batalantoj, kiuj bezonas knedanton por kunglui la nekunglueblan.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO



LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 90 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj per la sekvantaj ŝlosilvortoj:

8 7 1 9 11 36 5 24 18 22 : balkana lando
6 29 15 25 12 31 54 39 : tabaka veneno
14 13 3 15 41 73 20 55 59 : ŝtona ĉerko
26 27 65 37 35 16 61 : nomo de monato
84 2 76 48 23 10 68 80 : nomo de tago
17 48 32 56 86 44 38 45 82 : alpa floro
15 42 33 66 19 6 47 11 15 9 : granda festo
58 53 21 67 54 78 79 22 : orientazia lando
4 52 68 49 50 64 74 75 76 72 25 : eŭropa maro
43 51 40 90 88 89 : denove diri aŭ fari
14 77 2 60 30 62 39 : reĝa bastono
63 83 69 24 71 36 10 1 85 41 : favorrajto
46 57 56 87 81 59 : bulba floro
70 17 3 32 34 5 28 61 : malsupra domparto

1....90 : interesa aserto de la franca scienculo J. B. L. d'Alembert (1717-1783) pri kelkaj landoj de Eŭropo.

LA VIVO EN GRESILLON

APUD GREZILJONO

Laŭ la melodio (à la Bastille on aime bien)
Kanzoneto improvizita por la distra vespero
(49a S.A.T.-Amikara Kongreso en Grésillon, Pasko 1994a)

Refreno :

En Grezilion' fiere staras kastel'
meze de bela regiono
spitas la stel' al fi-Babel
en Greziliono !

Ĝuu dum promen'
vidon de l' dolmen'
sed ĉe la reir'
venu sen menhir'
Iam imitant'
de l'fama Roland'
ĝin breĉis laŭ l' dir'
per sia rapir'
Se la Ĉe-metod'
lernad' sen klopod'
aŭ la gramatik'
logas vin amik'
elektu kun ĝust'
laŭ la via gust'
inter ĉarma ŝi
kaj terura li

Refreno

se de la morbil'
tiklas vin bacil'
vi tuj kuru, hej !
al l' apotekej'
Se ĉe l' ekzamen'
ĝenas vin migren'
tiam aspirin'
tuj kuracos vin
Kaze de prosper'
ĝojon montru per
regal' sen avar'
al kongresanar'
Ĉe troa ĉagren'
pro l' fin' de l' kongres'
vi memoru jen :
pri l' kasteladres'

Refreno

... Sed, mi tedas tro
vi konsentu do
ke antaŭ ribel
silentu Marcel.





Kien li iras?

Al GRESILLON,
kompreneble!

Ĉu ankaŭ vi?

Petu informojn: ESPERANTO
Kastelo Gresillon - 49150-BAUGÉ

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr.fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr.fr.

NIA LIBRO-SERVO

POR LA PRAKTIKANTOJ: (P. Babin) - Taŭga por paroligi progresantojn.
5-a eldono - 35 fr.fr.

GRAMATIKA GVIDLIBRO: modernigita prezento - 50 fr.fr.

PREPARADO AL LA ATESTO PRI KAPABLECO: (A. Ribot) - 3-a eldono revizilta -
Prezo: 30 fr.fr.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

DE post substantiva radiko montras :

1

La posedanton
— la libro **de Petro,** li estas la fiero **de de sia patro.**

2

La posedatan econ : ĉevalo de blanka koloro (blank-kolora ĉevalo) homo de bela staturo (belstatura homo).

3

La rilaton inter du substantivoj (kiam la dua estas la mezuro de la unua) sumo de mil frankoj ; aĝo de ok dek jaroj.

4

La apartaĵon de aĵo :
prenu duonon de la kuko.

5

La aganton de la ago (ĉe elverba substantivo) la amo de la gepatroj ; la ŝuldo de nia kliento.

6

La objekton de la ago (ĉe elverba substantivo) mortigo de homo (mortigi homon) preparo de festo.

RIM : Uzo **de FARE DE** por eviti konfuzon inter **aganto** (5) kaj **objekto** (6) nutrado de la infanoj (nutri infanojn) fare de la patrino (la patrino nutras).


Simplan dependecon : prezo de pano ; utileco de esperanto.

NI RIMARKU

Por eviti eventualan miskomprenon, pli bone estas uzi, anstataŭ **DE**, pli taŭgan prepozicion :


kongreso **en** Lucerno ; fruktoj **el** la gârdeno ; rigardo **super** la libroj ; pruvoj **pri** lia kuraĝo ; preparoj **por** la festo ; ridi **pro** lia naiveco.

Mirindeco de la Meĥanismo :



Trakti informojn per komputero estas infanludo. Vidu : sumo de 2 720 431 litroj. Jen kio ni entuste verŝis kaj versôs sur tiun pavimon ĝis nia pensio.

Celebro de la Patrina Festo :



Jes, Paĉjo, Panjo preparis tre bonan manĝon. Nun, dum paĉjo faras sian sieston, ni serĉu en la televida programo, la specialan elsendon por la Festo de la Patrinoj.

Niaj perantoj

Aûstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aûstr. ŝil.).
Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).
Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).
Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).
Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).
Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).
Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).
Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).
Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).
Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ (2.800 esk.).
Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aû 25 internaciaj respondku ponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN